横浜エスペラント会のエスペラント文会報

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

[ **Avizo**: Tiu ĉi numero estas nur 2-paĝa. De la venonta numero ni rehavos. kutiman 4-paĝan eldonon. (la Redaktanto) ]

## TIEL OKAZIS — HAMA-RONDA VESPERO

## "La movado de volontuloj por ekscii pri aktivaj faŭltoj"

*la 2-a de novembro, 17h00-19h00, ĉambro 711
Ĉeestis 15 membroj.

La novembra temo de Hama-Ronda Vespero estis nekutima ĉe ni — prelego kun lumbildoj pri "La movado de volontuloj por ekscii pri aktivaj faŭltoj" fare de s-ro FUSE Kentarou. Li estas nia membro kaj unu el la membroj de "Esplora Grupo pri Aktivaj Faŭltoj en Miura Duoninsulo", civitana grupo por studi geologian karakterizon de la distrikto ĉirkaŭ ni, kaj por klerigi la popolon.

Nu, tertavoloj estas de loko al loko malkontinuaj je "faŭltoj". Inter alie, "aktivaj faŭltoj" estas tie, kie iam ajn okazos denova terŝoviĝo, kaŭzanta tertremojn. Kaj aktivaj faŭltoj laŭlonge etendiĝas strie tie kaj ĉi tie. Pri tio la grupo esploras en la urboj Zuŝi, Jokosuka ktp, nome en la Duoninsulo Miura (apud Jokohamo) kaj ĉirkaŭe.

La preleginto unue montris tian staton de la aktivaj faŭltoj per mapoj kaj grafikaĵoj, okazintajn damaĝojn tertremajn, precipe de la Tertremego en nia distrikto en 1923, kaj poste montris la tertavolojn sekcatajn, kiujn la Esplora Grupo vizitis. La grupo faras kursojn por malpliigi damaĝojn de tertremo, kaj tiaj agadoj estis ankaŭ klarigitaj.

Fine, la preleginto bedaŭris, ke la civitana grupo lastatempe 'maljuniĝis' pro la relative alta aĝo de la partoprenantoj, kiel estas simile al nia esperanta rondo.




■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO,Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: http://www.hamarondo.org
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

# NIAJ PLANOJ

## ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

*Regula Klaso en merkredo por legado de "Punkuino".

*Rudimenta Klaso en ĵaŭda vespero, de oktobro ĝis januaro — kun unu sola lernanto.

## ZAMENHOFA FESTO EN KAWASAKI

*la 15-a de decembro posttagmeze, en la Internacia Centro de Kawasaki

## JARFINA FESTENO DE LA RONDO

*la 21-a de decembro vespere, en la ĉina restoracio Fukuyoken, same kiel en la lasta jaro.

## LA JARKUNVENO DE JOKOHAMA ESPERANTO-RONDO

*la 26-a de januaro en Tikyuu-simin-plaza

Ĝi estos la plej supera decid-organo de nia rondo, en kiu ni resumos la jaran buĝeton kaj la raporton, kaj fiksos tiujn por 2014.

## EN "INTERNACIA FORUMO" DE JOKOHAMO

*la 9-a de februaro, 12h00-12h50, en la domo de JICA

Ni partoprenos en prelegaron, kiun organizos komitato de la rondoj aktivaj pri internaciaj agadoj en nia urbo, kaj prezentos nian rondon, kiu agadas en diversaj kampoj de internacia agado — prezenton de la japana kulturo al aliaj landoj, gastigon de alilandaj gastoj, forumo por internacia diskutado ktp.

# Voĉo de leganto

## el Odeso

Nia membro, s-ino Doi Ĉieko ricevis jenan retleteron el Odeso.




Kara sinjorino Doi Ĉieko!

Dum nia vica kluba kunveno ni diskutis pri kolora jara numero de gazeto «Novaĵoj Tamtamas». Ni pensas, ke laboro de Jokohama Esperanto-Rondo estas tre fruktodona. Ĉiumonate mi ricevas tiun interesan gazeton kaj kun plezuro legas ĝin.

En lasta numero ni kun ĝojo eksciis, ke nia malnova amiko Tanigawa Hirosi estas ne nur sana kaj vigla, sed efektive vojaĝas tra la mondo kun edzino. Odesanoj bone memoras pri lia agrabla vizito al Odeso dum ĝia 200-jariĝo.

Mi petas transdoni al Tanigawa Hirosi varmegan saluton de geklubanoj, sed aparte - de familio de Tamara Popova kaj de Ludmila Orajevskaja, kiu akompanis lin al domo de handikapuloj dum lia vizito al Odeso.

Skribu, kiel Vi fartas? Ni sukcese uzas Vian lernolibron «Hanako lernas esperanton».

Kiel fartas Keiiĉiro Suzuki kaj aliaj esperantistoj, kiuj iam vizitis Odeson?

Amike. Tamara Popova.